



UNIVERSITY OF GOTHENBURG  
SCHOOL OF BUSINESS, ECONOMICS AND LAW

**WORKING PAPERS IN ECONOMICS**

**No 476**

**De la germana al la angla en sveda ekonomiko**

**by**

**Bo Sandelin**

**December 2010**

**ISSN 1403-2473 (print)**  
**ISSN 1403-2465 (online)**

## De la germana al la angla en sveda ekonomiko

Bo Sandelin ([bo.sandelin@economics.gu.se](mailto:bo.sandelin@economics.gu.se))

**Abstract:** The pioneers of Swedish economics at the end of the 19th and beginning of the 20th century were to a large extent influenced by German ideas and German academic life. They went to Germany to study, and their scientific works were usually written in German or Swedish. During the 20th century the use of foreign language changed in favour of English. A similar transition from German to English can be found concerning the predominant language of foreign economics books acquired by Swedish university libraries, the language of doctoral theses in economics, and the language of works quoted in those theses. At the same time the position of the Swedish language declined. We discuss World War I, the German historical school, the Nazi period and World War II, the diminishing significance of geographical distance, and American demographic and academic growth as factors contributing to the transition from German to American influence, which had linguistic consequences.

**Keywords:** language; German; English; Swedish; influence; doctoral theses

**This paper is published as:**

Sandelin, Bo (2010), 'De la germana al la angla en sveda ekonomiko' in Blanke, D. & U. Lins (eds.): *La arto labori kune: Festlibro por Humphrey Tonkin*, UEA, Rotterdam, pp. 136-144. ISBN 978-92-9017-113-3.

**JEL-Codes:** A14; A23; B10; Z00

9 pages, December 2010

## De la germana al la angla en sveda ekonomiko

### Resumo

La pioniroj de la sveda ekonomiko antaŭ centoj da jaroj estis multe influitaj de germanaj ideoj. Iliaj studvojaĝoj iris plejofte al germanaj universitatoj, kaj iliaj sciencaj verkoj estis kutime en la lingvoj germana aŭ sveda. Tio poste ŝanĝiĝis favore al la angla. Similan transiron de la germana al la angla dum la 20-a jarcento oni trovas koncerne la lingvon de ekonomikaj libroj, akiritaj de bibliotekoj, la lingvon de doktoraj ekonomikaj disertacioj kaj la lingvon de cititaj verkoj en tiuj disertacioj. Samtempe la uzado de la sveda ŝrumpis. Kiel eblajn kaŭzojn de la forlaso de la germana ni pridiskutas la Unuan Mondmiliton, la historian skolon, la naziepokon kaj la Duan Mondmiliton, la malgrandigitan signifon de geografia distanco kaj la kreskantan plurflankan usonan influon.

### 1 Enkonduke

Dum pluraj antaŭaj jarcentoj ĉiuj flankoj de la sveda socio estis sub influo de precipe germanaj okazaĵoj kaj ideoj. La Hanso, asocio de germanaj komercistoj, ludis gravegan rolon en la ekonomia kaj politika evoluo de la skandinaviaj landoj dum la 14-a ĝis 16-a jarcentoj. Germanaj universitatoj estis la ĉefaj celoj de studvizitoj de svedaj studentoj ekde la 15-a jarcento, kaj meze de la 18-a jarcento 60 procentoj de la studentoj en Greifswald estis svedoj (Sörlin 1994: 128).

La granda influo de la germanlingva mondo restis, kiam ekonomiko formiĝis kiel moderna scienca fako fine de la 19-a jarcento<sup>1</sup>. Ankaŭ Usono tiam estis sub germana influo. Sekve, kiel rimarkigis Joseph Schumpeter (1954: 864): “La pilgrimado, precipe al Germanio, fariĝis por tiuj [usonaj ekonomikistoj], kiuj povis porti la kostojn, preskaŭ regula okazaĵo de ilia kariero, io simila al antikva kavalira vojaĝo.” Simile Dorfman (1955: 22) konstatis, ke el Usono iris “ĉiam kreskanta nombro de kolegiaj studentoj al Germanio por progresaj studoj en la 1870-aj kaj 1880-aj jaroj”.

Cent jarojn poste la situacio estas tute alia, ne nur en Svedio. Estas “motivo demandi sin, ĉu nun ekzistas ia ekonomiko ekster kaj sendepende de Usono” skribis Portes (1987: 1341), kaj Frey & Frey (1995: 185) konkludis ke “hodiaŭ akademia ekonomiko estas forte dominata de usonaj kleruloj, kio reflektiĝas en publikaĵoj, citaĵoj kaj ankaŭ en Nobelpremioj”.

Tiu transiro havis ankaŭ lingvajn konsekvencojn. En tiu ĉi ĉapitro ni koncentriĝos pri la sveda ekzemplo. Ni unue vidu, kian bazon havis la svedaj profesoroj pri ekonomiko antaŭ cent jaroj. Poste ni rigardu kelkajn bibliometriajn indikojn kiel la lingvo de libroj akiritaj de svedaj universitataj bibliotekoj, la lingvo de svedaj doktoraj disertacioj pri ekonomiko, kaj la lingvo de cititaj verkoj en tiaj disertacioj. Du tendencoj estas videblaj: formortado de la sveda lingvo kaj, koncerne fremdlingvojn, transiro de la germana al la angla. La fortigon de la angla ni trovas ankaŭ en la priekonomika edukado. Similajn tendencojn oni trovas en pluraj aliaj sciencaj fakoj, kiel ankaŭ en aliaj landoj. Fine, ni diskutos kelkajn faktorojn, kiuj evidente kontribuis al la forlaso de la germana.

### 2 La pioniroj

Antaŭ cent jaroj, en 1908, estis entute nur kvar profesoroj pri ekonomiko en Svedio: Knut Wicksell en Lund, David Davidson en Uppsala, Gustav Cassel en Stokholmo kaj

---

<sup>1</sup> Sub “ekonomiko” ni komprenas sociekonomikon.

Gustaf Steffen en Gotenburgo. Do, ili povas estis rigardataj kiel tiuj, kiuj tiam konsistigis la ekonomikan fakon en Svedio. Iliaj fontoj estis la fontoj de la fako, kaj la lingvoj, kiujn ili uzis, estis la lingvoj de la fako en Svedio.

Knut Wicksell (1851-1926) en la 1880-aj jaroj faris longajn studvizitojn en Londono, Berlino kaj Strasburgo. En lia germanlingva doktora disertacio *Zur Lehre von der Steuerincidenz* (1895), kiu fariĝis parto de lia pli konata verko *Finanztheoretische Untersuchungen* (1896), germanaj verkistoj ludis gravan rolon, sed tion faris ankaŭ la brito Alfred Marshall kaj la usonano Edwin Seligman. En lia kapitalteorio, prezentita germanlingve en *Über Wert, Kapital und Rente* (1893) kaj svedlingve en *Föreläsningar i nationalekonomi* (1901) la aŭstro Eugen von Böhm-Bawerk estis la ĉefinspirulo, sed ankaŭ la brito Stanley Jevons kaj la franco Léon Walras estis gravaj. La germanlingva makroekonomika ĉefverko de Wicksell *Geldzins und Güterpreise* (1898) povas esti rigardata kiel lia plej memstara kontribuo.

La gepatroj de David Davidson (1854-1942) venis el Germanio. Eli Heckscher (1951: 135) taksis la inspirfontojn de la svedlingva doktora disertacio de Davidson tiele: “La okcidenteŭropaj klasikuloj ne forestas [...] sed en la pezocentro sendube estas la plej bonaj germanlingvaj teoriistoj.” Duonjaron post la defendo de sia disertacio, en majo 1879, Davidson iris al Heidelberg por studi ĉe Karl Knies. En 1885 li vizitis la universitatojn de Lepsiko kaj Berlino por priesplori naciajn bankojn, kaj en 1886 li studis la enspezimpostadon en Bremeno, Hamburgo, Lubeko kaj Bazelo (Uhr 1991). Samtempe kaj poste kreskis lia intereso pri la brita klasikulo David Ricardo.

Gustaf Steffen (1864-1929) studis en la 1880-aj jaroj unue kemion, fizikon kaj mineralogion en Aachen kaj poste politikan ekonomion en Berlino. Fine de la jardeko li estis en Londono kaj lernis pri la neoklasika ekonomiko. Li fariĝis doktoro en Rostock en 1902 per germana versio de studo pri anglaj salajruloj. En artikolo en 1903 (“folkushållning”) li laŭdis la germanan historian skolon, kaj li mem fariĝis ties plej elstara reprezentanto en Svedio.

Gustav Cassel (1866-1945) ĉirkaŭ la centjarŝanĝo studis en Tübingen, Berlino kaj Göttingen. Kiel juna homo li estis karakterizata kiel “liberalulo kun kaj radikalaj kaj konservativaj trajtoj, venintaj el la 1880-aj kaj 1890-aj jaroj, el germana katedrosocialismo kaj angla fabianismo” (Carlson 1988: 33). Lia plej disvastigita verko publikigis unue germanlingve: *Theoretische Sozialökonomie* (1918).

La posta generacio pli turnis sin al Usono, kaj Germanio fariĝis malpli grava. La studvojaĝoj direktiĝis okcidenten. Gösta Bagge estis pioniro vizitanta Johns Hopkins-Universitaton en Baltimore en 1904-1905. Lin sekvis Johan Åkerman, kiu estis ĉe Harvard en 1919-1920, same kiel Bertil Ohlin kelkajn jarojn poste. Gunnar Myrdal elektis Columbia-Universitaton en Novjorko, kie li estis en 1929-1930.

La referencoj en la doktoraj disertacioj de la tri plej junaj (Åkerman, Myrdal kaj Ohlin) malofte estis publikigitaj en Germanio, sed pli ofte en Britio aŭ Usono. Por Åkerman 13 procentoj el la referencoj estis germanaj kaj 52 procentoj britaj aŭ usonaj. Por Myrdal tiuj procentoj estis 13 kaj 68, kaj por Ohlin 6 kaj 71, respektive. Germanio ne plu estis la lando, kie la estontaj gvidaj svedaj ekonomikistoj ĉefe trovis inspiron.


### 3 Lingvo de bibliotekaj libroj

Ni nun rigardu kelkajn bibliometriajn variablojn, kiuj povas esti indiko pri tiuj lingvoteritorioj, kiuj estis gravaj por svedaj ekonomikistoj<sup>2</sup>. Ĝis la dua duono de la 20-a jarcento la kunligo inter la lingvo de libro kaj la kutima lingvo de la loko de publikigo estis pli forta ol hodiaŭ, kiam ekzemple germanaj kaj nederlandaj eldonejoj publikigas multe da scienca literaturo en la angla.

<sup>2</sup> Tiuj variabloj estis antaŭe prezentitaj en Sandelin 1999a, 1999b kaj 2001.

En diagramo 1 ni vidas la lingvan dividon de eksterlandaj ekonomikaj libroj akiritaj de svedaj esplorbibliotekoj, ĉefe universitataj bibliotekoj.

Diagramo 1. Lingvo de ekonomikaj libroj akiritaj de svedaj esplorbibliotekoj



Fine de la 19-a jarcento ĉirkaŭ 60 procentoj el la libroj estis en la germana. Ekde la 1920-aj jaroj vidiĝis klare negativa tendenco, kaj en la 1950-aj jaroj la germanlingva porcio estis malpli ol 20 procentoj. (La eĉ malpli granda porcio en 1944-1947 kompreneble rezultas el malfacilaj cirkonstancoj lige al la Dua Mondmilito, precipe en Germanio.)


La spegulbildo de la malkresko de la germanlingva porcio estas la kresko de la anglalingva. Ĉirkaŭ la jarcentŝanĝo tiu estis komparebla kun la franclingva, t.e. ĝi ampleksis proksimume kvinonon de la eksterlandaj libroj. Meze de la 20-a jarcento la anglalingva porcio jam kreskis ĝis pli ol duono.

#### 4 Lingvo de doktoraj disertacioj

La lingvo de doktora disertacio evidente montras, en kiu tendaro la aŭtoro serĉas legantojn, sed verŝajne ankaŭ korelacias kun la lingvo de la verkoj, kiujn legis la aŭtoro. Probable ĝi ankaŭ indikas sciencan ambicion: verkisto konsideras la lingvon de admirataj antaŭuloj prestiĝodona kaj uzinda.

Diagramo 2 montras, en kiuj lingvoj estas verkitaj doktoraj disertacioj pri ekonomiko en Svedio dum 1895-1995.

Diagramo 2. Lingvo de svedaj doktoraj disertacioj pri ekonomiko



Dum tiuj 101 jaroj en la tuta lando aperis 415 aprobitaj disertacioj. Dum la unuaj jardekoj tio estis averaĝe malpli ol unu disertacio jare, sed en la fino de la periodo ĉirkaŭ 20 aperis ĉiujare.

La diagramo montras la procentojn de la tri uzitaj lingvoj. Ni vidas, ke fine de la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj disertacio ĉiam estis skribita en la sveda aŭ en la germana lingvo. La lasta disertacio en la germana – *Beiträge zur Standortstheorie* de Tord Palander – publikigis en 1935, kaj la unua en la angla – *A Study of Interest Rates* de Karin Kock – en 1929.

Post 1935 nur la sveda kaj la angla estas uzataj, sed la sveda iom post iom perdas terenon. Tamen, ankoraŭ dum la 1960-aj jaroj la sveda dominas: tiam 11 el la 18 disertacioj aperis en la sveda. Nur en la 1980-aj jaroj la angla klare superregas. En la 1990-aj jaroj nur escepte oni trovas svedlingvan disertacion.

## 5 Lingvo de cititaj verkoj

Alian indikon pri la ŝanĝiĝintaj pozicioj de diversaj lingvoj ni trovas en la lingvo de cititaj verkoj en la doktoraj disertacioj. La tabelo baziĝas sur la cititaj verkoj en sampla de 61 disertacioj el la 415 disertacioj pri ekonomiko publikigitaj en la periodo 1895-1995.

Periodo	Sveda	Angla	Germana	Franca	Itala	Dana/Norvega	Aliaj	Sume
1895-1919	42	20	24	8	2	2	2	100
1920-39	13	40	41	3	1	1	1	100
1940-59	54	38	4	2	0	0	2	100
1960-69	19	73	4	1	0	2	1	100
1970-79	22	74	1	1	0	2	0	100
1980-89	13	84	0	0	0	1	2	100
1990-95	4	88	1	0	0	0	7	100

### *Lingvoj de cititaj verkoj en svedaj ekonomikaj doktoraj disertacioj. Procentoj*

La ĉefa tendenco ripetiĝas. Post la 1930-aj jaroj oni malofte citas germanlingvajn verkojn. Ankaŭ publikigaĵoj en la franca kaj itala lingvoj malaperis. Komence de la jarcento oni citis itallingvajn verkojn danke al tradicie forta itala pozicio pri la teorio de publikaj financoj. En la fino de la periodo la angla lingvo tute superregas, kaj eĉ la sveda preskaŭ malaperas<sup>3</sup>.

Koncerne la svedan ja temas ne pri kontinua regreso. Frapas la malalta sveda procenta nombro por 1920-39 kaj la alta por 1940-59. En la 1920-aj kaj 1930-aj jaroj pluraj disertacioj kun teoria emfazo publikigis, ekzemple de la postaj nobelpremiitoj Gunnar Myrdal kaj Bertil Ohlin kaj aliaj el la t.n. Stokholma skolo. Teorioj ja estas pli-malpli internaciaj, kio klarigas la malgrandan nombron de la svedaj referencoj. Kontraŭe, en la 1940-aj kaj 1950-aj jaroj peze empiriaj disertacioj pri la sveda ekonomio superregis, kio rezultigis multajn svedlingvajn referencojn.

La granda variado de la svedlingva procentaĵo iom kaŝas la persistan transiron de la germana al la angla koncerne fremdlingvajn referencojn. Ni vidas tion pli klare, se ni dividas la anglan procentaĵon per la germana. Por la unuaj kvin periodoj ni ricevas la jenan serion de kvocientoj: 0,8, 1, 10, 18, 74.

<sup>3</sup> La sufiĉe alta germana procentaĵo ankoraŭ en 1920-1939 ĉefe dependas de grandega referencolisto en la lasta germanlingva disertacio. En tiu periodo nur 3 el 16 disertacioj estis germanlingvaj. La eble surprizaj 8 procentoj sub "Aliaj" 1990-1995 klariĝas jene: La nombroj por 1990-95 baziĝas sur sampla de 12 el 125 disertacioj. Unu el tiuj 12 disertacioj temas pri Sovetunio. En ĝi estas cititaj 84 ruslingvaj verkoj, kiuj konsistigas tri kvaronojn el la 8 procentoj.

## 6 Lingvo en ekonomika instruado

Kiam ekonomiko fariĝis universitata fako en Svedio per katedro en Uppsala, en 1741, ĝi diferencis de pli malnovaj fakoj per tio, ke la instruado dekomence estis en la sveda lingvo kaj ne en la latina. Tiel la fako estu utila por la praktika ekonomio. La unua profesoro, Anders Berch, ankaŭ skribis svedlingvan lernolibron, kiu estis uzata dum ĉirkaŭ 80 jaroj.

Se ni rigardas la libroliston de bazaj universitataj kursoj komence de la 20-a jarcento, frapas ke estis titoloj en pluraj lingvoj: en la sveda, la germana, la angla kaj eĉ en la franca. Meze de la 1960-aj jaroj, kiam mi ekstudis ekonomikon en Lund, kursotekstoj ekzistis nur en la angla kaj sveda, sed tiuj kiuj studis kelkajn jarojn pli frue, povis rakonti, ke tiam la ĉeflibro estis en la germana. La preleglingvo de la instruisto estis la sveda.

De post 1969 doktoriĝa edukado en Svedio konsistas el du partoj: Trapasinte bazan universitatan ekzamenon, la aspirantoj, kiuj estas akceptitaj kiel doktoriĝaj kandidatoj, por du jaroj komencas viziti doktoriĝajn kursojn. Tiujn ĉi kursojn sekvas la verkado de la disertacio. Kiam mi mem ĉirkaŭ 1970 partoprenis doktoriĝajn kursojn en la Universitato de Lund, la instrulingvo ĉiam estis la sveda, escepte de kiam eksterlandaj gastprofesoroj aperis. La legendaj kursotekstoj estis ĉefe en la angla, sed kelkfoje en la sveda, dana aŭ norvega. La situacio restis proksimume la sama, kiam mi mem komencis instrui doktoriĝantojn en la universitato de Gotenburgo.

En la dua duono de la 1980-aj jaroj la premisoj ŝanĝiĝis. Ni akceptis kelkajn eksterlandajn doktoriĝajn kandidatojn, kiuj tre malbone komprenis la svedan. Kelkaj prelegistoj tuj ekuzis la anglan kiel preleglingvon. Tio estis rigardata kiel internaciigo, kio estas io bona.

Mi mem iom hezitis, kaj la unuan jaron mi uzis alterne ambaŭ lingvojn, tiel ke mi unue dum kelkaj minutoj klarigis aferon en la sveda kaj poste donis resumon en la angla. Tio kompreneble estis tre maloportuna instrumaniero, kaj baldaŭ ankaŭ mi cedis.

En la 1990-aj jaroj kaj poste, laŭ mia scio, ni donis eĉ ne unu doktoriĝan ekonomikan kurson en la sveda lingvo. De post la unuaj 90-aj jaroj ni havis oficialajn rilatojn kun afrikaj universitatoj, de kie venis doktoriĝantoj, kiuj kompreneble ne komprenis la svedan. En la lasta jardeko ni pli-malpli aktive klopodis varbi kandidatojn internaciskale, kaj nun pluraj venas el Azio, Afriko, Sudameriko kaj la antaŭe socialismaj landoj. Rezulte, eble pli ol duono de la ĉirkaŭ 10 novaj doktoriĝaj kandidatoj, kiuj venas ĉiun duan jaron, ne komprenas la svedan, kaj tiu situacio ne estas unika por Gotenburgo.

Sekve, instruado per la angla en la doktoriĝaj kursoj eble estas neevitebla adaptiĝo de universitata instituto, kiu volas eviti izoliĝon kaj provincismon. Sed tia adaptiĝo havas konatajn "kostojn". Preleganto esprimas sin malpli klare en la angla ol en sia gepatra lingvo, kaj kandidato komprenas malpli bone en la angla ol en sia gepatra lingvo. Do, ambaŭflanke la komunikado malboniĝas.

Sur la baza nivelo la sveda restas instrulingvo en svedaj universitatoj, sed ne ekskluzive. Ŝajnas, ke precipe iuj malgrandaj altlernejoj, kiuj malfacile varbas sufiĉe da studentoj, de la komenco instruas en la angla por povi varbi ankaŭ eksterlandajn studentojn. Lernolibroj estas kaj anglalingvaj kaj svedlingvaj tie, kie oni instruas en la sveda.

## 7 Kio klarigas la forlason de la germana?

Nia ekzameno de gvidaj personoj, lingvoj de bibliotekaj libroj, lingvoj de doktoraj disertacioj, referencoj en tiaj disertacioj kaj la lingvo en instruado montras pli-malpli en la sama direkto: Post la unuaj jardekoj de la 20-a jarcento la germana perdis sian dominan pozicion inter fremdlingvoj en la sveda ekonomiko, favore al la angla. Simile okazis en aliaj fakoj. Oni ja povus simple klarigi la lingvoevoluo kiel konsekvencon de la ĝenerala evoluo de politika kaj ekonomia potencoj. Tamen, en la ĝenerala evoluo ni povas distingi diversajn faktorojn, kiuj estas individuaj klarigaj kandidatoj, kiuj povus kune efiki. Ni diskutu la Unuan

Mondmiliton, la eblan rolon de la historia skolo, la naziepokon kun la Dua Mondmilito, la malkreskintan signifon de geografia distanco kaj la kreskon de la usona loĝantaro kaj de la usona ekonomiko.

### 7.1 La Unua Mondmilito

La malglora rezulto de la Unua Mondmilito kaj la postmilita ĥaoso en Germanio dum la 1920-aj jaroj certe malgrandigis la influon de germanaj ekonomikistoj. Ne nur rektaj kontaktoj inter svedoj kaj germanoj malfaciligis pro la milito, krome, Germanio perdis prestiĝon. “La Unua Mondmilito, la politikaj disvolvigoj en Germanio inter la militoj, kaj poste ankaŭ la Dua Mondmilito, ĉio probable malinstigis komercajn studentojn viziti Germanion”, skribis Engwall (1992 :154).

### 7.2 Ebla daŭriga rolo de la historia skolo

Fine de la 19-a jarcento okazis internacia trarompo de la neoklasika ekonomika skolo, t.e. de dedukta teoria rezonado, kie marĝenaj grandoj ludas gravan rolon. En Svedio unue Knut Wicksell disvastigis tiun skolon. La historia ekonomika skola, kiu originis el Germanio, kaj kiu kontraŭe preferis induktan rezonadon el empiriaj faktoj, perdis terenon, ne nur en Svedio<sup>4</sup>.

Henry Spiegel (1997: 351) forte argumentis, ke emo de germanaj ekonomikistoj konservi la historian skolon, kiam ĝi jam malmoderniĝis aliloke, malhelpis la evoluon de ekonomiko en Germanio, kaj ke germanaj ekonomikistoj tial perdis influon. La historia skolo “regis efektive sen kontesto en Germanio ĝis la Dua Mondmilito” laŭ Spiegel. Krome,

[...] eble la fantomo de historia ekonomiko ankoraŭ vivas kaj fortondis la flugilojn de germanaj ekonomikistoj en la postmilita mondo. Nek germana ekzilito, nek germana ekonomikisto hejme estas kronita per la Nobel-premio.<sup>5</sup>

Ni povas fari almenaŭ du komentojn. Unue, la fondintoj de moderna ekonomiko en Svedio ne estis tre impresitaj de la historia skolo. Wicksell rekonis la statistikajn kaj historiajn kontribuojn de la skolo, substrekante tamen:

Sed pro sia unuflankeco, pro sia pure negativa, bruske malakceptanta, jes ankaŭ aroganta kaj ofendanta sinteno, kiun tiu skolo ankoraŭ adoptas pri la nuntempa teoria kaj sistemiga esplorado, ĝi laŭ mi malhelpis kaj damaĝis la evoluon de la scienco, precipe en Germanio. (Wicksell 1904: 463)

Gustav Cassel dum periodo en sia juneco aprezis la socialan mesaĝon, sed lia opinio pri la teoria sinteno de la historia skolo similis al tiu de Wicksell.

Due, la opinio de Spiegel, ke la historia skolo dominis en Germanio ĝis la Dua Mondmilito, estas kontestita. Alia komentisto asertas, ke jam “fine de la Unua Mondmilito la historia skolo perdis sian superregan paradigman pozicion en la germana ekonomiko” (Hagemann 1998: 356). Simile, Janssen (1998: 12) certigas, ke la klasika-neoklasika tradicio “en la 1920-aj jaroj jam konsiderinde flankenŝovis historiismon kaj romantikismon el ilia domina pozicio”.

Do, la argumento de Spiegel estas dubinda. Kaj eĉ se li esence pravus, pluvivado de la historia skolo en Germanio ne povus esti la sola kaŭzo de malkreskanta germana influo, ĉar tia malkresko okazis ankaŭ en aliaj faktoj.

<sup>4</sup> Superrigardo pri la karaktero de diversaj skoloj troviĝas en Sandelin/Trautwein/Wundrak 2008a kaj 2008b.

<sup>5</sup> Tion Spiegel evidente skribis antaŭ ol Reinhard Selten en 1994 ricevis la premion.



### 7.3 La naziepoko kaj la Dua Mondmilito

La naziepoko signifis ne nur restriktajn al tio, kion oni povis skribi en Germanio. Multaj ekonomikistoj maldungiĝis aŭ trovis la situacion neeltenebla kaj forlasis la landon. Tio ne nur malfortigis la fakon en Germanio, sed ankaŭ fortigis ĝin en la rifuĝeja lando.

Pro la forpelado de sciencistoj el Germanio, kaj de 1938 ankaŭ el Aŭstrio kaj aliaj eŭropaj landoj, multaj sukcespromesaj, sed de tiam ankaŭ 'maldezirataj' disvolviĝoj rompiĝis ankaŭ en la ekonomiko. Pro la forpelado la germana scienco en multaj fakoj (kiel ekzemple nuklea fiziko) falis malantaŭ la internacian sciencon normon. [...] Aliflanke, la forpelitaj ekonomikistoj multoble fekundigis ne nur la evoluon de siaj fakspcialecoj en la akceptantaj landoj (kiel Usono, Britio, Turkio aŭ Israelo), sed decide kunpregis la internacian esplornormon,

konkludas Hagemann (1997: 7)<sup>6</sup>. En la nova lando la migrintoj kutime komencis verki en nova lingvo, precipe en la angla.

La nazipolitiko influis la karakteron de la ekonomika fako en Germanio. Laŭ Janssen (1998 :13) la elmigrado trafis klasikismon kaj neoklasikismon pli forte ol la historian skolon, kies anoj estis favorataj, kiam novaj postenoj estis okupotaj. Alianco inter la historia skolo kaj la naziismo ŝajne estis kreota, sed post proceso de reciproka kritiko, la ligo inter la du kampoj rompiĝis.

La politika subpremo en la 1930-aj kaj 1940-aj jaroj certe estis grava faktoro de la malkresko de la germana influo kaj de la signifo de la germana lingvo. Sed ĝi apenaŭ donas kompletan klarigon. Ni jam vidis, ke laŭ la studvojaĝoj de svedaj ekonomikistoj kaj laŭ la indiko "eksterlandaj ekonomikaj libroj akiritaj de svedaj esploraj bibliotekoj", la malsupreniro komenciĝis pli frue. Eble ni devus konkludi, ke la naziismo kaj la Dua Mondmilito akcelis proceson, kiu jam antaŭe komenciĝis.

### 7.4 La malgrandigita rolo de geografia distanco

La komunika sistemo ja multe pliboniĝis de post la 19-a jarcento. Nun estas preskaŭ same facile iri al universitato en Usono kiel al germana universitato, kaj per telefona aŭ retroŝta komunikado la diferenco estas tute forigita.

Unu el la avantaĝoj de Germanio por svedaj sciencistoj – la malpli longa tempodistanco tien – tial fariĝis malpli grava. Tio verŝajne kontribuis al la relativa malkresko de la germana influo.

Dirinte tion, ni devus tamen rimarkigi, ke eĉ en la 19-a jarcento la tempodistanco ne haltigis la fortan influon de Germanio al Usono, kiel niaj enkondukaj citaĵoj de Schumpeter kaj Dorfman montras; superrigardon donas Carlson (1995: 45-63). La germana historia skolo por usonanoj reprezentis ion novan, kio logis usonajn studentojn, kiuj, reveninte hejmen, defuis la tradician klasikinspirititan pensadon. La unua programo de *American Economic Association*, fondita en 1885, estas klara esprimo de ideoj de la germana historia skolo. Do, ni ne neglektu, sed ankaŭ ne troigu la signifon de faciligita komunikado por la malgrandigita germana rolo.

### 7.5 La usona kresko

Usono kaj la angla lingvo transprenis la rolon de Germanio kaj la germana lingvo por la sveda ekonomiko. Mezuroj, kiujn ni uzis – procentoj de diversaj grandoj – donas al la grado de signifo karakteron de nulsuma ludo: se ies procentoj kreskas, aliulaj devas malkreski.

Usono estas juna nacio. Ĝia loĝantaro pli ol duobligis inter 1880 kaj 1930, dum la relativa kresko de la loĝantaro de Germanio estis proksimume duone tiom granda, post ĝustigo

---

<sup>6</sup> Hagemann/Krohn 1992 donas detalojn pri 314 germanlingvaj ekonomikistoj, kiuj elmigris post 1933.

pro cedoĵoj de teritorioj. Plie, la germana universitata sistemo estis frue evoluinta. Germanaj universitatoj estis antaŭuloj kiel esplorantaj universitatoj, dum la usonaj universitatoj nur fine de la 19-a jarcento imitis la sukcesan germanan modelon.<sup>7</sup> En Usono la ekonomika fako, “startante de preskaŭ nulo en 1870”, poste rapide ekspansiis (Schumpeter 1954: 864).

Do, la pli rapida kresko de la loĝantaro en Usono tie verŝajne kontribuis al pli rapida kresko en la nombro de sciencistoj ol en Germanio. Krome, ĉar la usona ekonomiko startis de malalta nivelo fine de la 19-a jarcento ĝia relativa kresko povis pli facile esti rapida.

## 8 Konklude

Nesurprize pluraj indikoj montras malgrandigon dum la 20-a jarcento de la signifo de germanaj ideoj kaj la germana lingvo<sup>8</sup>. Tiu malgrandigo ŝajne estis precipe forta dum la 1920-aj kaj 1940-aj jaroj, t.e. post la Unua Mondmilito kaj post la naziperiodo. Tiuj okazaĵoj evidente estis gravaj, sed ni ankaŭ proponis aliajn kontribuantajn faktorojn.

Ni faris pli da peno klarigi la ŝrumpadon de la germanlingva pozicio ol la kreskon de la usona kaj anglalingva. Ni akceptu tion, sed faru nur unu kompletigon. En interesa speciala numero de *Kyklos* (n-ro 2, 1995) multaj artikoloj temis pri la diferenco inter usona kaj eŭropa ekonomiko. Pluraj aŭtoroj rimarkigis, ke la usona “merkato” por ekonomikistoj estas pli granda kaj pli konkurenca ol la naciaj eŭropaj. Tio rezultigis usonan universitatan ekonomikon, kiu malpli akcentas ekonomian politikon sed pli emfazas progresintajn teorion kaj teknikon, ĉar tiuj donas pli da prestiĝo en universitataj rondoj. Tiu usona ekonomiko fariĝis idealo, kiu influis ankaŭ eŭropanojn. Tamen, tio estas priskribo pri la situacio en la 1990-aj jaroj kaj verŝajne en malpli alta grado efikis, kiam la malgermaniga proceso estis plej rapida.

Estas malfacile kontentige klarigi tiajn sociajn procesojn, kiajn ni pridiskutis. Tio validas kaj por la kvanta signifo de diversaj faktoroj kaj por la ĉeno de kaŭzoj. Serĉi la praantaŭan kaŭzon estus vane, kaj kondukus al senfina rezonado pri la kaŭzoj de la kaŭzoj, simile al la rezonado de la 19-a-jarcenta ekonomikisto Stanley Jevons, kiu trovis la originon de konjunkturaj cikloj en la sunmakuloj<sup>9</sup>.

## Bibliografio

- Black, Collison R.D. (1987): “Jevons, William Stanley”. En: *The New Palgrave. A Dictionary of Economics*. London-Basingtoke: Macmillan.
- Carlson, Benny (1988): *Staten som monster*. Lund: Studentlitteratur.
- Cassel, Gustav (1918): *Theoretische Sozialökonomie*. Leipzig: C.F. Wintersche Verlagshandlung.
- Dorfman, Joseph (1955): “The Role of the German Historical School in American Economic Thought”. En: *The American Economic Review* 45/2, p. 17-28.
- Engwall, Lars (1992): *Mercury Meets Minerva*. Oxford: Pergamon Press.
- Frey, René L.; Bruno S. Frey (1995): “Is There a European Economics?” En: *Kyklos* 48/2, p. 185-186.
- Hagemann, Harald (1997, ed.): *Zur deutschsprachigen wirtschaftswissenschaftlichen Emigration nach 1933*. Marburg: Metropolis-Verlag.

<sup>7</sup> La Universitato de Berlino fondiĝis en 1810 kaj karakteriziĝis per tio, ke la instruistoj devis ne nur instrui, kiel ofte estis antaŭe, sed ankaŭ libere esploradi kaj gvidi seminariojn. Tiu modelo disvastiĝis ankaŭ ekster Germanio. “En 1876 la Johns Hopkins-Universitato fondiĝis en Baltimore kiel la unua usona institucio enkorpianta la germanan idealon pri universitata edukado. Ekde tiam doktora edukado estis grava aspekto de multaj institucioj” (Moore 1993).

<sup>8</sup> La fluo de ideoj ne estis unudirekta, kvankam ni ĉefe rigardis la pli fortan, t.e. tiun, kiu iris al Svedio. La alidirekta estas pritraktita en Sandelin/Trautwein 2008.

<sup>9</sup> Black 1987 priskribas, kiel tiu ideo disvolviĝis en la merkado de Jevons.

- (1998): Recenzo pri “Klaus-Rainer Brintzinger: Die Nationalökonomie an den Universitäten Freiburg, Heidelberg und Tübingen 1918-1945”. En: *The European Journal of the History of Economic Thought* 5/2, p. 356-358.
- ; Claus-Dieter Krohn (1992): *Die Emigration deutschsprachiger Wirtschaftswissenschaftler nach 1933*. 2. erw. Auflage. Stuttgart: Universität Hohenheim (Diskussionsbeiträge aus dem Institut für Volkswirtschaftslehre, 520).
- Heckscher, Eli F. (1951): “David Davidson”. En: *Ekonomisk Tidskrift* 53, p. 127-160.
- Janssen, Hauke (1998): *Nationalökonomie und Nationalsozialismus*. Marburg: Metropolis-Verlag.
- Moore, Kathryn M. (1993): “University”. En: *The New Grolier Multimedia Encyclopedia*, Release 6. (CD-ROM-versio.)
- Palander, Tord (1935): *Beiträge zur Standortstheorie*. Uppsala: Almqvist & Wiksell.
- Portes, Richard (1987): “Economics in Europe”. En: *European Economic Review* 31, p. 1329-1340.
- Sandelin, Bo (1999a): “Avgermaniseringen av nationalekonomin: det svenska exemplet”. En: *Ekonomiska Samfundets Tidskrift* 52/2, p. 57-71.
- (1999b): “Lingvo en nelingva doktoriĝa edukado”. En: *Internacia Pedagogia Revuo* 29/1, p. 8-14.
- (2001): “The De-Germanization of Swedish Economics”. En: *History of Political Economy* 33/3, p. 517-539.
- ; Hans-Michael Trautwein, Richard Wundrak (2008a): *A Short History of Economic Thought*. 2nd edition. London, New York: Routledge.
- ; Hans-Michael Trautwein, Richard Wundrak (2008b): *Det ekonomiska tänkandets historia*. 4 uppl. Stockholm: SNS Förlag.
- ; Hans-Michael Trautwein (2008): *The Baltic Exchange: Mutual Influences between Economists in the German and Swedish Language Areas*. Göteborg: Department of Economics, Göteborg University (*Working Papers in Economics* No 288). <http://swopec.hhs.se/gunwpe/abs/gunwpe0288.htm>.
- Schumpeter, Joseph A. (1954): *History of Economic Analysis*. Oxford University Press.
- Sörlin, Sverker (1994): *De lärdaas republik*. Malmö: Liber-Hermods.
- Spiegel, Henry W. (1997): “Refugee Economists and the Mathematization of Economics”. En: Hagemann, Harald (ed.): *Zur deutschsprachigen wirtschaftswissenschaftlichen Emigration nach 1933*. Marburg: Metropolis-Verlag, p. 343-352.
- Steffen, Gustaf (1903): “Om begreppet folkhushållning”. En: *Ekonomisk Tidskrift* 5, p. 1-15.
- Uhr, Carl G. (1991): “David Davidson: the transition to neoclassical economics”. En: Sandelin, Bo (ed.): *The History of Swedish Economic Thought*. London, New York: Routledge, p. 44-75.
- Wicksell, Knut (1893): *Über Wert, Kapital und Rente nach den neueren nationalökonomischen Theorien*. Jena: Verlag von Gustav Fischer.
- (1895): *Zur Lehre von der Steuerincidenz*. Uppsala.
- (1896): *Finanztheoretische Untersuchungen nebst Darstellung und Kritik des Steuerwesens Schwedens*. Jena: Verlag von Gustav Fischer.
- (1898): *Geldzins und Güterpreise. Eine Studie über die den Tauschwert des Geldes bestimmenden Ursachen*. Jena: Verlag von Gustav Fischer.
- (1901): *Föreläsningar i nationalekonomi*. Lund: Gleerups.
- (1904): “Mål och medel i nationalekonomin”. En: *Ekonomisk Tidskrift* 6, p. 457-474.

---

### Bo Sandelin

Nask. 1942. Doktoro kaj profesoro pri ekonomiko ĉe la Universitato de Gotenburgo; prezidanto de Sveda Esperanto-Instituto, 1993-2001.

---